
Junio 1954 Jarkolekto 51 No. 437

# ESPERO KATOLIKA

## HONORA KOMITATO POR NIA XXVa.




Jam akceptis la inviton aliĝi al la honora komitato (alfabeta listo).

Mons-ro H.J.A.M. Eras, religia konsilanto de N.K., Vught.
Mons-ro G. P. J. v. d. Burgt, Dekano de Amsterdam.
Prof.o d.ro Jos. J. Gielen, eks-ministro de Instruado, profesoro en la Katolika Universitato, Nijmegen.
S-ro P. Heilker, eksprezidanto de I.K.U.E., Soestdijk.
Prof.o d.ro J. B. Kors O.P., Prezidanto de la Katolika Radio Stacio, Hilversum.
Mons-ro mr. F. J. C. M. Op de Coul, Direktoro de la Katolika Centra Oficejo de Instruado, 's-Gravenhage.
S-ro Mr. K. van Rijckevorsel, parlementano, 's-Gravenhage.
S-ro W. Steinmetz, skabeno, Amsterdam.

*

## LA IMITADO DE KRISTO.

Ĵus aperis en Esperanto! La traduko estas la lasta laboro de nia mortinta pioniro, Frato Wigbertus van Zon, eldonita kun eklezia aprobo sub la aŭspicio de I.K.I. Havebla ĉe nia Libro-Servo, 336 pĝ. en tola bindo; prezoj: simpla f 3,50, luksa f 4,50 + afranko. Recenzo sekvos.

*

## MALAVARA DONACO AL I.K.U.E.

De nia samideano Frato Charles Cummingsmith s.m. en Honolulu, Hawaii, nia organizo IKUE ricevis heredaĵon sub la formo de ĉiujaraj dividendoj. Lia kara formortinta patrino volis doni tiun sumon al IKUE, ĉar ŝi per tiu faro volis helpi nian movadon katolikan sub la speciala aspekto de nia pormisia laboro. Frato Cummingsmith mem estas misiisto kaj fervora esperantisto. IKUE kore dankas la laboreman Fraton kaj en la preĝoj certe ne forgesos lian patrinon.

Beckers, prez. de Jong, sekr.

## LA TRAGEDIO GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

Por kompreni la enhavon de la dramo oni devas koni kelkajn detalojn de la historio de Holando kaj de Amsterdam en la fino de la 13a jarcento. En tiu tempo Holando estis graflando, kies estro, grafo FLORIS LA KVINA, tre favoris la leviĝantajn urbojn kaj pro tio ofte venis en konflikton kun la nobeloj, kiuj malvalonte vidis la kreskantan potencon de la malestimataj burĝoj. Kelkaj nobeloj, inter kiuj GYSBREGT VAN AEMSTEL, GERAERT VAN VELZEN kaj HERMAN VAN WOERDEN, estis la ĉefaj, konspiris kaj sukcesis perfide aresti la grafon. Sed antaŭ ol ili povis transporti la arestiton al Anglujo, ili estis persekutataj kaj atakataj de la kuniĝintaj burĝoj de KENNEMERLAND kaj WATERLAND kaj por malebligi la reliberigon de sia viktimo, ili mortigis lin. Tio okazis en la jaro 1296. Kelkaj el la konspirintaj nobeloj estis mortigataj de la burĝoj, sed la tri suprenomitaj gvidantoj sukcesis forkuri. La filo de FLORIS nun estiĝis grafo JAN LA UNUA, sed tiu ĉi jam mortis en 1299.

Post la morto de grafo JAN LA UNUA, GYSBREGT revenis en sian urbon Amsterdam kaj fortikigis ĝin per pontoj, remparoj kaj turoj, por defendi sin kontraŭ atako de siaj malamikoj. Efektive la Haarlemanoj kaj la Waterlandanoj sieĝis la urbon, detruis kaj bruligis ĝin kaj forpelis VAN AEMSTEL.

Sur tiu pli malpli historia fono VONDEL verkis sian dramon. Li kreis lokanhistorian tragedion, kiu plaĉos al la amantoj de poezio kaj teatro kaj plenigos iliajn korojn per amo al Amsterdam.

NOTO. Por la prezentado de la teatraĵo „Gysbregt van Aemstel" ni uzos la tradukon laŭ la nederlanda originalo de **Inĝ. J. R. G. Isbrucker,** prezidanto de la „Akademio de Esperanto".

*

## I.K.I. VII.

Kiel, kaj kial I.K.I. estiĝis?

Estis la jaro 1932. Pro diversaj malĝojigaj cirkonstancoj nia E.K. ne plu povis esti eldonata kaj la unuunura katolika voĉo ne plu aŭdiĝis en la granda Esperantolando, kie tamen povis flori la multaj ne- aŭ eĉ kontraŭkatolikaj eldonaĵoj. Tia stato afliktis la animon de fervora katolika Esperantisto nederlanda kiu, ankaŭ sur alia tereno, kunlaboris kun la granda Apologia Unuiĝo Petro Kaniso. Li cerbumadis longan tempon kaj fine kredis esti trovinta elturniĝon: li enpresigis en diversajn nekatolikajn esp.-revuojn la sekvantan anoncon: „Nekatolikoj kiuj deziras informojn pri la katolika Religio povas ricevi ilin senpage ĉe...." (sekvis lia adreso en Brielle). La saman anoncon do, kiun IKI ankoraŭ nuntempe lokigas en nekat. esp. gazetojn, la anoncon, kiu nun certe al vi ĉiuj ne plu estas nekonata.

Poste s-ro Goossens, la iniciatinto, povis nur atendi ĉu envenos iu peto tia. Kaj la informpetoj jes envenis! Je tiu unua anonco oni ricevis 160 leterojn. Vi mem povas kompreni ke tia laboro estas troa por unu solo persono. La paroĥestro de Brielle ekokupiĝis. Tamen la laboro, la respondado, la klarigado, tiel superŝutis la du homojn, ke oni estis devigata alvoki la helpon de la jam nomita Apologia Unuiĝo Petro Kaniso. Tiu ĉi unuiĝo sin direktis al la Nederlanda Katolika Esperanto Unuiĝo N.K. kun la peto elekti komisionon, kiu transprenos la gigantan laboron. Tiu komisiono fondiĝis la 1an de Julio 1934 sub la nomo Internacia Katolika Informejo. Jen do I.K.I. kiu ade petas viajn kunhelpon kaj subtenon.

Neniam forgesu!

E. H.

Ni devas admiri la sciencon kaj la saĝecon de tiu Papo BENEDIKTO XIVa kiu, antaŭ jam du jarcentoj, sciis tiom perfekte formuli tiujn Leĝojn.
Kiam la Laŭkanona Komisio ne akceptas iun resaniĝon, ĝi ne neas ĝian supernaturan karakteron, sed ĝi rifuzas pruvi ties aŭtentikecon; en tiu okazo la „resaniĝo" estas iu supernatura favoro, sed ne miraklo.
Kiam la Laŭkanona Komisio de iu Dioceso estas tute studinta la eksterordinaran resaniĝon kiu estas elmetita antaŭ ĝi, ĝi ankoraŭ esploras: „Ĉu tiu resaniĝo estus eble falsa miraklo?"
Resaniĝo estas falsa miraklo, se:
en la fino, la agento, la rimedoj, la kondiĉoj, la sekvaĵoj de la fenomeno eksterordinara efektivigita, oni trovas ion frivolan, ridindan, maldecan, hontindan, malfacile tolereblan, malpian, malhumilan, mensogan, aŭ difektan, kiel ajn.
Kontraŭe, se ĉio estas konvena, serioza, inkliniganta al pieco, al la religio, al sankteco, tiu preternatura afero sen ia dubo ne devenas de la diablo. Se ĉiuj tiuj signoj ekzistas samtempe en la miregindaĵo, oni povas, kun morala certeco, ĝin konsideri kiel Dia miregindaĵo. Ĉar per la tutaĵo de la cirkonstancoj, kiuj ĉirkaŭas la resaniĝon, oni povos distingi ĝian realan devenon kaj ĝin enklasigi kiel estanta de la Dia Supernaturo, aŭ de la diabla preternaturo.
La vere efektivaj resaniĝoj estas malmultaj; ĉar multe da pseŭdo-resaniĝoj estas malakceptataj de la kuracistoj, ekzemple: la pretendataj resaniĝoj de histeraj malsanoj ne estas akceptitaj; la pretenditaj resaniĝoj de nervaj malsanoj **neorganikaj** ne estas akceptitaj, nek la resaniĝoj de organikaj malsanoj, eĉ se ili estas realaj, kiam la malsanuloj ne havas medicinan dokumentaron kun si, aŭ kiam la postenketo ne permesas havi dokumentaron. Tio estas logika.
Pri la medicinaj skribaj atestoj la Oficejkuracistoj estas postulemaj, ĉar la cirkonstancoj tion postulas. Ĉiu atesto tro mallonga, tro resuma, banala, ne subtenita per sciencaj estimoj, malpreciza, estas suspektebla, ĉar nesufiĉa por pruvi kiel eble plej ekzaktan diagnozon. Tial ni insistas apud la Organismoj organizantaj la Pilgrimojn, — la eparĥiaj Organismoj — por ke la Dokumentaroj de la malsanuloj estu kiel eble plej kompletaj, koncerne la sciencan valoron kaj la gradon. Ho ve, sufiĉe ofte la malsincereco, aŭ la moktimo, la indiferenteco, la antaŭdecideco aŭ la maldiligento de iuj kuracantaj kuracistoj estis prirespondaj pri la neoficiala akcepto de iuj supernaturaj resaniĝoj, ĉar ties atestoj estis redaktitaj, pli aŭ malpli kun plena scio, je ne-scienca maniero. Tamen estas konstatenda ke multaj kuracistoj kaj profesoroj redaktas la atestojn science kaj konscience. Ho jes, nuntempe neniu neas ke Lourdes estas urbo kie strangaj faktoj okazas; tio estas: strangaj sciencaj faktoj, medicinaj faktoj. Hodiaŭ multaj kuracistoj konas tiujn faktojn. Ili scias ke en la Konstatoficejo aliaj kuracistoj legos iliajn atestojn. Ankaŭ la plimulto el la atestoj estas korektaj kaj tre zorge kompilitaj.
Kelkatempe iuj „falsaj" malsanuloj, sin dirantaj „resaniĝintaj", eniras la Oficejon, levante la kapon, tromultvortaj, kun ruza aŭ perfidema mieno. Ili estas senmaskigotaj: demandado, ekzameno, enketo estos malfavoraj al ili. Ili estas hontigotaj. Kelkaj falsaj malsanuloj konfesis ke ili estis senditaj al Lourdes kaj al la Konstatoficejo, de sektoj antireligiaj, kontraŭreligiaj, por diskrediti la Katolikan Religion, kaj la kuracistojn de Lourdes....

(Daŭrigota) D-ro Paul Léger.

*

## NOTOJ PRI LA EVOLUKONCEPTO.

Denove mi demandis al mi, ĉu mi devus rekomenci malnovan diskutadon, kiu aperis sur la paĝoj de ĉi tiu gazeto antaŭ kelkaj jaroj. Tamen, mi konsideras la temon tiel grava, ke mi decidis aldoni mian komentaron al tiuj de la aliaj polemikantoj, kiuj skribis pri ĝi. Mi aludas al la diskutoj de S-roj C. Stöp-Bowitz kaj L.G.C. De Jong koncerne la evoluon, kiuj aperis en Espero Katolika en Julio 1950. Mi ne nomas min aŭtoritatulo pri biologiaj aŭ teologiaj problemoj, sed mi interesiĝas pri tiaj temoj, kaj do mi estas leginta pri la diversaj teorioj de evoluo kaj pri siaj teologiaj aspektoj. Pro tio, mi pensas ke Katolikoj devus scii, ke ekzistas certaj evoluteorioj, kiuj eĉ postulas la devenon de la homa korpo de tiuj de la bestoj, kiuj ne kontraŭdiras la katolikan doktrinon, kvankam aliaj teorioj devas esti kondamnataj, ĉar ili estas kontraŭreligiaj. Oni memoru, tamen, ke la tielnomata „kristana evoluo" postulas paralelan evoluon de la homaro kaj la bestaro, sed ĝi neas la ideon de la deveno de la homa korpo de la besta.

Pro tio ke la du artikoloj aperis jam antaŭ kelkaj jaroj, mi skizu, malmultvorte, la ĉefajn ideojn de la aŭtoroj. S-ro Stöp-Bowitz, la originala skribanto (lia artikolo unue aperis en La Heroldo [1]) kredas ke la homo malmulte diferencas de la superaj mambestoj kaj ke, pro tiu rezono, la homo mem estas nur besto kies cerbo evoluis plimulte ol la cerboj de la aliaj bestoj. Do, oni povas konkludi, la homaro ne diferencas de la bestaro, ĉar ekzistas specoj en kiu la kolo, aŭ la stomako, estas evoluinta plimulte ol tiuj de la aliaj specoj.

Kontraŭege, tamen, S-ro De Jong kredas ke la vera heredo-scienco estas tiu de la famkonata monaĥo, Johano Gregoro Mendel, en kiu li montris ke „ili restas simioj el simioj" kaj homoj el homoj. De ĉi tiu scienco, laŭ S-ro De Jong, ni devas konkludi ke ne povas esti evoluo de unu vivanta speco al alia.

Ŝajnas al mi, ke ambaŭ opinioj estas tro fortaj. Ĉu S-ro Stöp-Bowitz volas diri, ke la posedo de granda cerbo ne diferencas de la posedo de, ekzemple, granda stomako? Eĉ supozante, ke la proceso laŭ kiu la granda cerbo evoluis ĉe la homo estas ĥemie simila al tiuj laŭ kiuj evoluis aliaj organoj ĉe aliaj estaĵoj, ĉu oni povas supozi ke la rezultoj estas identaj? Mi opinias, ke tio ne estas vera, ĉar unu produktaĵo ankoraŭ estas nur besto, kiu eble povas plimulte manĝi, dank' al pligranda stomako, sed kiu ankoraŭ devas obei siajn praajn instinktojn. La alia, tamen, estas tre diferenca, ĉar ĉi tie la tuto estas pligranda ol la sumo de siaj partoj; li povas **elekti,** ĉar li havas cerbon, kiu kapabligas lin aŭ sekvi la bestajn instinktojn aŭ uzi sian korpan energion por fari plinoblajn aĵojn. Estas nur la grandcerba kreitaĵo, kiu kapablas posedi senmortan animon, ĉar li sola povas malobei la vokon de siaj organoj.

Aliflanke, la vidpunkto de S-ro De Jong ne enhavas la fakton ke la Mendel'aj eksperimentoj estis mallongtempaj, dum la evoluo, se ĝi efektiviĝis, daŭris dum multaj milionoj da jaroj. Do, la Mendel'a kaj evoluaj teorioj ne estas reciproke ekskluzivaj, ĉar mutacio, kiam ĝi ekestas nature, stabiliĝas nur post dekmiloj aŭ centmiloj da jaroj. Do, la Mendel'a teorio estas korekta, sed dum periodo kiu, kvankam ĝi estas granda, estas malgraŭe limata.

Estas interese rimarki ke, en encikliko, kiu aperis antaŭ tri aŭ kvar jaroj,[2]) lia papa moŝto Pio XIIa, skribis ke katolikaj scienculoj kaj teologoj povas diskuti kun libereco la problemon de evoluo se ili gardos sin kontraŭ certaj eraroj, t.e., *a*) se ili ne supozos, ke la homa animo devenas de tiu de la bestoj, *b*) se ili ne supozos, ke la homaro havas pli ol du unuajn gepatrojn; t.e., se ili ne diros, ke per la nomoj Adam kaj Eva la S. Skribo efektive intencas diri „certa nombro

da unuaj gepatroj", kaj c) se ĉiuj volos akcepti la juĝon de la Eklezio, kiam ŝi fine decidos oficiale elparoli pri tiu temo.
Ĉi tiu skribaĵo ne estas peno **pruvi** ke la evoluo estas vera, ĉar la skribanto agnoskas ke pruvo ne ankoraŭ ekzistas; eble ĝi neniam ekzistos. Mi deziras anstataŭe montri la manieron laŭ kiu la du aliaj aŭtoroj tro forte eldiris siajn argumentojn.
Ni estu singardaj. Ni rigardu kiel veraj Katolikoj la teoriojn de la sciencoj kaj ne timu ke vera scienco iam ajn kontraŭdiros nian veran religion.

R. J. Brown, Usono.

Notoj de la Redakcio: 1) Pri ĉi tiu temo verkis E.F.G. kaj C. Stöp-Bowitz en La Heroldo 1950, n.8,11,16; 1951,8.
2) Encikliko „Humani Generis", 12-8-1950. (A.A.S. 42, 1950,561-578).

*

## IAM KAJ NUN.

Preskaŭ antaŭ du mil jaroj vivis en Palestino dekdu viroj, kies unu ne plu transvivis la unuan Sanktan Vendredon, ĉar lin malesperigis la demono de la malbono en lia brusto, la demono de la regema avareco, ankaŭ nuntempe la vera estiganto de la malpaco inter la homoj. La restintaj dekunu diskuris, kiam ilia admirita Majstro translasis sin al siaj senkompataj kontraŭuloj kaj ne fondis la surteran regnon de ili atenditan kaj ne donis al ili la sopiritajn postenojn de altaj korteganoj kaj ministroj. Ili kaŝis sin pro timo eĉ, kiam la Reviviĝinto ankoraŭ kvardek tagojn estadis kun ili. Sed en la kvindeka tago la timemuloj subite ŝanĝiĝis je veraj herooj kaj poste mortis ĝoje kiel martiroj escepte de la juna Johano, la preferita disĉiplo de la krucumita Venkinto super la morto, kiu disĉiplo sola revenis sur la lokojn de la tragedio, venkinte la unuan teruron pro la kruda arestiĝo de lia Sinjoro, kaj helpadis filece la Patrinon de la doloroj eĉ sub la kruco de la Savinto. Ĉi tion efikis la tria persono de la plej sankta Triunuo, la Sankta Spirito, la spirito de la vero kaj forto.
Kaj kiel estas nun post preskaŭ du mil jaroj?
La plej multaj katolikoj montriĝas ne kiel apostoloj aŭ martiroj. Ni kontentiĝas, admiri tiun miraklon de la graco kaj la eksterordinaran ekzemplon de l'apostoloj kaj martiroj. Eble ni ankaŭ fieras, ke ankaŭ nuntempe vivas kaj suferas martiroj. Sed ĉu ni imitas?
Pri tiu ĉi diferencego de la unuaj kaj la nunaj kristanoj, kiuj krome estas ankaŭ konfirmitaj per la sakramento de la Sankta Spirito, diris la fama radioepiskopo Msgro **Sheen**, ke la nuna situacio estas tute mala. Hodiaŭ la kontraŭuloj de nia idearo kaj eklezio, de la tuta kristanaro, atakas, dum ni kristanoj klopodas defendi kaj konservi la havatan. La modernaj kristanoj posedas la veron, sed ne la konvenan pasion; la materialistoj de niaj tagoj havas pasion, sed ne la veron. Ili ardas, sed ne lumas. Ni posedas lumon, sed ne ardon. Ili havas entuziasmon, sed ne idealojn. Ni havas idealojn, sed ne entuziasmon. Ĉi tion konstatis plende kaj ĉagreniĝinte plej kompetenta Amerikano kaj per ĝi trafis ankaŭ la situacion de la mondo malnova. Ĉi tiun preskaŭ malesperigan staton ne ŝanĝos kanonoj kaj aliaj mortigiloj de la freneza kaj aĉetebla scienco de niaj tagoj. Ankaŭ ne kontraktoj pri komuna defendado. Ĝin ŝanĝos nur homoj ree pentemaj kaj la plej efika armilo, la sincera, humila preĝo el koroj pretaj por venkoj ne per armeoj, sed per la senperfortemo, kiun instruis la kruco sur Golgoto. Sed... por tia menso la okcidento ŝajnas ne plu kapabla. La pli suferema kristanaro de l'oriento kredeble pli taŭgas kiel instrumento de la Dia providenco, por savi la

homaron por la eterneco; tie oni pli fidas al Kristo ol al sia propra intelekto' Jen la solvo!

D-ro Adolf Halbedl.

*

## ORA JUBILEO.

La 1an de Majo, Frato Ludoviko de la Fratoj de Karitato, festis en la Noviciato kie li nun loĝas, sian oran jubileon. (Adr.: Broeders v. Liefde, Maria Aalter,Belg.). La jubilanto estas esperantisto de la frua epoko. Jam en 1906 li kun Frato Isidore fondis la Ligon de blindaj Esperantistoj (vidu Enciklopedio de Esp.).
Dum 45 jaroj li instruis la blindulojn en la Reĝa Instituto por Blinduloj en Woluwe St Lambert. Li estis kaj ankoraŭ ĉiam estas fervora samideano. Kiam temis pri rabato ĉe fervojo kaj tramo por la blinduloj, la belga registaro postulis enketon en aliaj landoj: Frato Ludoviko tuj kaptis la okazon, dirante al la ministro: „Mi faros tion per Esperanto''. Li skribis al multaj landoj kaj ricevis 32 respondojn, kiuj plene konvinkis la registaron, tiel ke la demandita favoro estis konsentata.
Frato Ludoviko fiere montris al mi tiujn leterojn, kiujn li ĉiam konservadas. Inter la korespondaĵoj mi rimarkis konatajn nomojn kiel Thillander, D-ro Eltschkner, ktp.
Ni dankas Dion pro la fruktodona vivo de tiu vere modela religiulo kaj esperantisto, dezirante al li ankoraŭ multajn feliĉajn jarojn!

Frato Arni.

*

## NEKROLOGO.

Nur nun ni sciiĝis, ke mortis en Februaro 1953 fidela samideanino nia, la 80-jara, tamen pri la venko de Esperanto tute konvinkita adeptino, la monaĥino de la Ordeno de Sta. Ursula, patrino (Mater) Aloisia Schröder. Kun distingo ŝi antaŭ jaroj faris la ŝtatan ekzamenon por Esperanto kaj gvidis multajn kursojn en la monaĥina lernejo Wien, Gentzgasse. La lernejo devis esti fermata 1938, kiam Aŭstrujo estis perforte aligita al la nacisocialista Germanujo. Fratino Aloisia dum la lastaj siaj vivjaroj estis en urba monaĥinejo Wien I., Tie ŝi, kiel ŝi konfesis al nia malnova fidela samcelanino d-ro. Brunhilde Flasch, membro de la ŝtata ekzamenkomisiono por Esp., kvankam izolulino, ĉiutage parolis nian karan lingvon, preĝante laŭte en Esperanto! La bona Dio rekompencu ŝin per la eterna paco, sed al ni ŝi estu modelo kaj instigo!

W.M.

*

## ANONCETOJ.

S-ro E. Knipprath, MERSENICH ü. Düren (Rhld), Germanujo, **dez. koresp.** pri Mariahonorado kaj interŝ. bildetojn pri tio. *

S-ro A. Geers. Henrick de Keyzerplein 36, AMSTERDAM (Ned.) **dez. koresp.** k.ĉ.l., p.ĉ.t. sed precipe volonte ricevus p.k. el la tuta mondo. Nepre respondos ĉiun. *

**Helpu propagandi nian lingvon en oficialaj medioj** sendante gratulleterojn, aŭ prefere ilustr. kartojn, okaze de omaĝfesto okazonta 27.7.54 honore al unua Esp. instruanto en nia urbo, katolika pastro de la Piaj Lernejoj. Adr. al la peranto: s-ro V. Hernandez Llusera (por Pastro Marko Lliró), Str. Avda. Ejército Espanol 59, SABADELL. Represo petata. Koresp. alvenanta postdate ankaŭ efikos. *

## D-RO MAX JOSEF METZGER - „FRATO PAŬLO".

Nunjare (17.IV.1954) estis dek jaroj, ke li falis per la ekzekutistoj de la Tria Regno. Jen mortis vera heroo de la paco kaj unueco en Kristo!

Naskita en Schopfheim (Baden, Sudgermanujo) 1887 kiel filo de mezlerneja profesoro, li 1911 fariĝis sacerdoto kaj doktoro de teologio.

Dum la unua mondmilito li fariĝis arda pac-apostolo kaj en 1917, kunfondinto de Mondpacligo „BLANKA KRUCO" en Graz, (Aŭstrio). Benedikto XVa, la granda papo de la paco, aprobis kaj speciale benis lian pacprogramon. D-ro. Metzger ankaŭ baldaŭ ekkonis la porpacan signifon de Esperanto, ĝin tuj eklernis kaj praktike aplikis.

Post kelkaj jaroj Frato Paŭlo (jen lia nomo kiel estro de la nuna „Kristo-Reĝo-Societo de la Blanka Kruco") translokiĝis al Meitingen (Bavario), tiam ĉefsidejo de la societo, kiu dum la novpagana naci-socialista reĝimo devis multon suferi. Dum la Hitler-Milito li troviĝis en Berlino. En novembro 1939 oni lin pro nenomitaj kaŭzoj arestis; sed baldaŭ li ree liberiĝis. Tamen li restis severe observata flanke de la al li malfavoraj ŝtataj potenculoj.

Ne plu povante publike labori por la paco, li des pli ofereme klopodis en la agadkampo de la „UNA-SANCTA" movado, kies vigla servanto li ankaŭ estis, celanta reciprokan komprenemon kaj alproksimiĝon de ĉiuj kristanoj, precipe inter katolikoj kaj protestantoj, kiuj tiam en esencaj aferoj multe kunagis por barado de la kontraŭkristana reĝimo.

Iutage venis al li sinjorino, naskita svedino, Dagmar Irmgart, esprimanta sian ŝaton kaj taksadon por liaj noblaj celadoj; ŝi gajnis lian fidon, tiel ke li konfideme al ŝi transdonis leteron al la sveda, al li amika episkopo (protestanta) Eidam de Upsala, petante porpacan interrilatadon kun ekleziuloj kaj aliaj eminentuloj de la „aliancanoj" (la t.n. „malamikaj landoj") Sed la menciita virino estis efektive spionino de „Gestapo"! Je la festo de la S. apostoloj Petro kaj Paŭlo, la 29an de Junio 1943, Frato Paŭlo estis arestita.

Dum la proceso ĉefaj argumentoj por akuzo kaj kondamno estis la en jaro 1917(!) de li verkita broŝuro „PACO SUR TERO" („Friede auf Erden") kaj citita lia „letero al la malamikoj" kaj lia „dubo je la venko". La ĝenerale timegata prezidanto de la „popola juĝistaro", Freisler deklaris i.a. ke la agado de la akuzito estis tiel fia kaj krimeca, ke li, „tia pesttubero" devas esti ekstermata. Estas raportite, ke li des pli furiozis ju pli Frato Paŭlo trankvile respondis resp. defendis sian vidpunkton, kiom malmulte tio estis ebligita.

La verdikto tekstis: „Kondamno al morto kaj dumviva civilrajta degradado" „Nun ĝi okazis. Mi estas trankvila. Mi prezentis mian vivon al Dio por la paco de la mondo kaj la unueco de la eklezio. Se Dio ĝin akceptas, mi ĝojas. Se Dio ankoraŭ plu donacas al mi la vivon, mi ankaŭ estas dankema. Kiel Dio volas!" li diris poste en al li permesita mallonga interparolado! Sed oni esperis je ebla pardonigo, por kiu multaj, eĉ la papo persone, ekleziularo, precipe ankaŭ la episkopo de Berlino, klopodegis; tamen vane. La 17an de aprilo 1944 je la 15, 26 h. Frato Paŭlo estis senkapigata en Brandenburg, ĝis lastmomente estante kortrankvila kaj Di-sindona, mortante kiel unu el la nemalmultaj per sia sango atestantoj por la paco de Kristo kaj kontraŭ moderna pagana-naciismo!

La lin kondamninta prezidanto Freisler mortis kiel viktimo de aeratako dum la lastaj milittagoj, kiel prezidanto sangema en nova „popoljuĝa proceso", kiun li do ne plu povis fini. Malsuprenfaleganta trabo kaŭzis lian morton.

W. Mudrak, Vieno.

*

## RECENZOJ.

**Johann Hammond Rosbach:** Bagatelaro. Eld. Esperantoforlaget Oslo 1951. Prezo f 4,—. La aŭtoro baziĝas sur la koncepto ke la vivo fakte nur konsistas el aro da bagateloj. En 22 rakontoj li skizas en tre bona Esperanto diversajn epizodojn, ĉiuj tre plaĉaj kaj interesaj. T.D.

*

Triesto... al kiu? Eld. Slovenia Ligo, Poŝtfako 275, Ljubljana, Jugoslavio. Havebla kontraŭ 1 resp. kup. — Al kiu? Kompreneble al Jugoslavio, laŭ tiu broŝuro. EK ne okupas sin pri politiko kaj ĝenerale povas esti al ni egale al kiu apartenas unu aŭ alia regiono. Sed ni ne volonte vidus ke novaj miloj da homoj venus sub la jugon de reĝimo, kiu persekutas personojn pro ilia fideleco al Eklezio kaj konscienco, malliberigas sacerdotojn, episkopojn kaj eĉ Kardinalon! Cetere akuzo kontraŭ la Vatikano kaj kelkaj episkopoj (p.35) jam ne kaŭzas konfidon al katolikoj! T.D.

*

**Diversaj Aŭtoroj:** Novaj Esperanto-Historietoj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj. 72 p. Prezo f 1,90. — Bonstilaj anekdotoj kaj rakontoj, tre konvenaj por kursoj kaj klubvesperoj. Bonega ekzercmaterialo por komencantoj

*

**Adi:** La Forto de l'Vero. Eld. Dansk Esp. Forlag, Aabyhoj. 64 p. Prezo f 1,90. Jen vera kvankam mallonga romano, en tre simpla, bona stilo, do taŭga por komencantoj. La enhavo tamen povas interesi plenkreskulojn. Bedaŭrinde facile legeblaj verketoj ordinare nur taŭgas por infanoj: ĉu niaj verkistoj ne scias, ke la plej multaj komencantoj estas plenkreskuloj? Ni esperu, ke oni estonte pli atentu tiun fakton! Intertempe laŭdon al la verkisto de ĉi tiu romaneto! T.D.

*

**Japanaj Infanoj:** El japana lando kaj popolo. Eld. Heibon-sya, Tokio. Prezo 30 Yen. Tre bonaspekta, 20-paĝa, ilustr. libreto kun bonstilaj rakontoj de japanaj infanoj por la infanoj tutmondaj. La Infana Fako de Redakcio en Heibon-sha, No. 4, Yomban-tyo (Kozimati) Tiypda-ku, Tokio, intencas eldoni serion da tiuj libretoj kun rakontoj de diverslandaj infanoj. Ensendu verkaĵetojn pri via vivo, lando, popolo, poemojn, desegnaĵojn ktp. menciante la aĝon. Jen bela tasko por geinstruistoj kaj grupoj por veki la intereson de la infanoj! T.D.

*

**Geraldo Mattos:** Ivan la Sesa. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Poŝtkesto 3677, Rio de Janeiro, Brazilo. Prezo: broŝ. f 4,90; bind. f 6,50, Kvinakta historia teatraĵo, originale verkita en Esp. La verkisto sukcesis prezenti la dramon en tre bonstila, bone legebla poezio. Nur por konservi la ritmon li kelkfoje devis perforti la regulojn de l'akcento. La iniciato estas tre laŭdinda kaj ni esperas ke la eldonejo povos plenumi sian promeson, iom post iom eldoni serion da originalaj teatraĵoj. Tio kompreneble dependas de la aĉetemo de l'Esperantistaro! T.D,

*

Laŭkutime E.K. ne aperos en Aŭgusto; la julia numero aperos proks. 10.7., la sekvonta numero, kiu enhavos la raportojn pri nia XXVa en Amsterdam, kaj ampleksos 12 paĝojn, je 1.9.54.
Ni ankoraŭfoje atentigas niajn legantojn, ke pro libertempo la Admin. de IKUE estos fermita de 3-30 Junio, Redaktejo de EK kaj Libro-Servo de 3-22 Junio 1954.